

# La Espero

2005:4

## Esperanto en Stokholma Universitato Esperanto på Stockholms universitet



En Stokholma universitato oni povas studi Esperanton A kaj Esperanton B. Ambaŭ kursoj estas dudekpoentaj. La bildo montras la partoprenintojn de Esperanto B, ĵus finintaj la kurson.

La nomoj de maldekstre: Anders Eriksson, Yuriko Dalnäs, Bertil Nilsson, Joakim Enwall, Agneta Emanuelsson, Siv Sjögren, Ulla Luin.

Fotis Helena Andersson, ankaŭ studento. Mankas en la bildo Britta Kennedy.

\*\*\*

På Stockholms universitet är det möjligt att läsa Esperanto A och Esperanto B. Båda tjugopoängskurser. Bilden visar deltagarna i Esperanto B, som just slutfört kursen.

Namnen från vänster: Anders Eriksson, Yuriko Dalnäs, Bertil Nilsson, Joakim Enwall, Agneta Emanuelsson, Siv Sjögren, Ulla Luin.

Fot: Helena Andersson, också student. På bilden saknas Britta Kennedy.

## kaj en somera kurso en Lesjöfors och på sommarkurs i Lesjöfors

Tute alia maniero studi estas partopreni la somerajn kursojn en EsperantoDomo en Lesjöfors. Legu pri la someraj kursoj sur paĝo 3.

\*\*\*

Ett helt annat sätt att studera esperanto är att delta i sommarkurserna på EsperantoGården i Lesjöfors. Läs om sommarkurserna på sidan 3.



## LA ESPERO

### Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694  
Septembro 2005 • 93-a jarkolekto  
Fondita en 1913

**Redaktion:** Leif Nordenstorm

#### Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

**E-post:** [esperanto@globalnet.net](mailto:esperanto@globalnet.net)

**Ansvarig utgivare** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

**Tryck:** Al-fab-eto, Skövde

**Prenumeration 2005:** 200 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Adress:** Esperanto-Centro,  
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
tel. 08-34 08 00

**E-post:** [sef@esperanto.se](mailto:sef@esperanto.se)

**Nätsida:** [www.esperanto.se](http://www.esperanto.se)

**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

**Postgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

#### Medlemsavgift 2005:

Direktansluten medlem 200 kr.  
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.  
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*.  
Tilläggssexemplar kostar 100 kr/år).

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

**Telefon:** 08 - 34 08 00

**Fax:** 08 - 34 08 10

**Postgiro:** 578-5

**Nätsida:** [www.esperanto.se/eldona](http://www.esperanto.se/eldona)

**Telefontid:** Samma som Esperanto-Centro Stockholm.  
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

**Styrelsens ordförande:** Anita Dagmarsdotter

### Manus till *La Espero*

sänds till Leif Nordenstorm

Järnvägsgränd 11

961 76 Boden

tel. 0921-123 54

**e-post:** [nordenstorm@globalnet.net](mailto:nordenstorm@globalnet.net)

När kommer *La Espero* 2005?

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

## NI PREZENTAS

# Bengt-Olof Åradsson

Nova prezidanto de Sveda Esperanto-Federacio

#### *Kie vi naskiĝis?*

Mi naskiĝis en Mörarp, tiama komunumo proksimume 15 km oriente de Helsingborg, sed post 9 monatoj mia familio, kaj mi kun ili, transloĝiĝis al Påarp kiu situas iomete pli proksime al Helsingborg.

#### *Kie vi loĝas?*

Mi de post preskau 2 jaroj loĝas en Nynäshamn, kiu situas sude de Stokholmo. Per trajno 1 horon mi vojaĝas al Stockholmo kie mi laboras.

#### *Pri kio vi laboras?*

Pri labormedio (*arbetsmiljö*) ĉe Arbetsmiljöverket kaj pli precize mia laboro temas pri la interludo/interagado inter homo-maŝino-organizo. Antaŭ kelkaj dekoj da jaroj labormedio multe temis pri la maŝinoj kaj iliaj ŝirmiloj sed nuntempe estas multe pli da psiko-sociaj problemoj kaj organizaj cirkonstancoj.

#### *Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?*

Legi, lerni aliajn lingvojn, fotado kaj komputado estas miaj plej ŝatataj intereso. Iam mi ankaŭ aktiviĝis en la skolta movado sed jam dum multaj jaroj mi ne okupas min pri tio.

#### *Ĉu vi havas familion?*

Mi divorcis antaŭ unu jaro kaj havas 17-jaran filinon kiu loĝas en Skanio.

#### *De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?*

En 1971 aŭ eble 1972 mi eklernis Esperanton sed jam 5-6 jarojn antaŭe mi interesiĝis pri la lingvo kiam mi legis artikolon en Helsingborgs Dagblad pri la plej facila lingvo en la mondo. Bedaŭrinde mi nur trovis libron pri Ido en la biblioteko. Do nur alveninte al Lund kaj ricevinte reklaman flugfolion pri esperanto kaj komenco-ta kurso mia revo plenumiĝis.

#### **Estimataj samideanoj!**

Mi estas anstataŭanto en la regiona parlamento (*landstingsfullmäktige*) de Norda Botnio. La ordinara reprezentanto malofte forestas, sed ĉi-jare en Junio mi la unuan fojon devis anstataŭi ŝin en dutaga kunveno en Överkalix. Mi surmetis mian jakon. Sur ĝi estis tri insignoj, tiujn de la Popola partio, de la Sveda Eklezio kaj la verda Esperanto-stelo.

Kafrankante antaŭ la kunveno mi iom hontis ke mi portas tri insignojn. Ĉu homoj opinios ke mi estas strangulo? Mi pripensis ĉu mi forigu du insignojn kaj nur lasi la politikan? Ne, mi lasis ĉiujn.

Kafrinkinte mi eniris la halon, kie okazos la kunveno. Salutis min unu el la ordinara reprezentantoj per la vortoj: "Mi vidas ke vi portas la verdan stelon. Mi ĝojas ke esperantisto estas tie ĉi." Dank' al la verda stelo mi renkontis Ingmar Åberg el Luleå (Maldekstra partio). Ferminte la kunvenon ŝi eĉ salutis min esperanto. Estas utile porti la stelon por trovi aliaj esperantistojn!

**Via redaktoro**



#### *Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?*

Jes, mi jam delonge estas membro de KELI kaj ekde januaro 2005 mi redaktas ĝian dumonatan revuon "Dia Regno". Krom tio mi ankaŭ estas la kasisto de la sveda sekcio de KELI. Pro la malkresko de membraro, nun ne estas peziga laboro esti kasisto. La redaktado postulas pli da tempo sed estas ankoraŭ interesa laboro kaj redonas al mi multe da ĝojo.

#### *Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi?*

Kiel mi jam antaŭe respondis, mi ŝatas lerni lingvojn. Tio ne signifas ke mi estas lerta, nur interesiĝas pri tio. Mia nuna projekto estas la hungara lingvo sed mi sentas ke la libera tempo elĉerpiĝis. Pro mia redaktada laboro kaj fotado mi ankaŭ provas profundigi mian scion pri kompostado, grafika arto kaj la digitala fototekniko. Ne mankas interesaj, nur tempo.

Skribe intervjuis: **Leif Nordenstorm**

# Somera kurso kun multaj grupoj

## JUBILEA KONGRESO

"100-jara jubilea jarkongreso en Malmö 25-28 Majo 2006".

Okaze de la 100-jariĝo de Sveda Esperanto-Federacio kaj Klubo Esperantista de Malmö ni festos komunan jarkongreson kun Dana Esperanto Asocio en Malmö. Por informoj: [www.agado.net](http://www.agado.net) aŭ

*Okazis Internaciaj Esperanto-Kursoj en EsperantoDomo en Lesjöfors 27 Junio-2 Julio.*

Kvardeko da kursanoj povis elekti inter kelkaj niveloj. Malgraŭ elektoeblecoj, tri el la kvin grupoj formiĝis kiel oni povus atendi. Kvin knabinoj multe kantis kun siaj gvidantinoj Beatrix kaj Berit.

El Ludvika venis sep personoj, kiuj jam studis kune ekde septembro pasintjare. Ilin Anna-Maria-Lange stiris per lerta kaj sperta mano.

Tre speciala grupo konsistis el gejunuloj el diversaj landoj - tri el Germanio, Francio, Ĉeĥio, Grekio kaj Svedio. Tiuj sep personoj apartenis al internacia asocio, kiu aranĝas laborprojektojn por gejunuloj. Ili do venis por labori kiel helpantoj en la Esperanto-domo. En tiu projekto estis planita partopreno en kurso por komencantoj. Ilin insturis Bertil Nilsson.

Puff Östling el Örebro, kiu instruas la anglan en lernejo, gvidis grupon de komencantoj-preskaŭ komencantoj. En tiu grupo sidis tri virinoj el regiono sude de Borås. Ili simile al la Ludvika-anoj jam partoprenis en studrondo, kiun unu el la tri virinoj, Ragnhild, iniciatis.

En la televida angulo, duaetaĝe, sidis la jam spertaj kursanoj, ekzemple filinoj de Martin Strid (prezidanto de la estraro de Esperanto-Gården), filino de Beatrix kaj filo de Puff. Tiuj grupanoj bone konversaciis sub gvido de la konata Nata Bertse. Nata, kiu estas tre lerta en kantado kaj gitarlu-



*Nata Bertse kompreneble kantigis la grupanojn. Fotis: Roland Lindblom.*

dado, kompreneble kantigis la grupanojn.

La preskaŭ nelacigebla Lennart Svensson, ricevis helpon de esperantistoj en la kuirejo. Yuejin Guo estas profesia kuiristo, kaj edzo de Puff. Yuejin kaj Puff renkontiĝis dum la Universala Kongreso en Pekino 1986. Du aliaj kutimaj helpantoj estis Karin Rylander kaj Viktor Söderqvist (nova estrarano en la Gotenburga klubo).

Vespere la lastan kursotagon okazis amuza programo en la muzeo de Lesjöfors. Pluraj el la kursanoj prezentis siajn kapablojn kanti kaj ludi. Estis bona surprizo aŭskulti kiam la juna Björn Guo (14-jara) violonis kun la violonisto Martin Strid, ludantaj folklorajn melodiojn.

Anders Bertse venis aparte al Le-

sjöfors por ludi kun sia edzino Nata Bertse. Ili kantas kaj ludas entuziasme kaj bele, kiam la laŭtparoliloj kaj tekniko funkcias.

Post lunĉo la lastan tagon mi eliris kaj komencis paroli kun unu el la kursanoj. Post kelkaj minutoj ŝi diris ke ŝi iom konas min? Kaj ŝi diris sian nomon, Ursula Kwasniewska. Jes, kompreneble. Ursula trastudis mian leterkuron tre rapide kaj kun bona rezulto. Mi tiam rekomendis al ŝi viziti aŭ la klubon en Lund aŭ en Malmö. Ŝi iris al Malmö kaj partoprenis kurson. Mi povis konstati ke ŝi jam bone povas konversacii. konsekvence ŝi vizitis la kongreson en Vilnius.

Vere rekomendinta kursarango.

**Roland Lindblom**

## Bokcirkel

Under vintern tänker jag läsa/bläddra/skumläsa några aktuella esperanto-böcker. Lite mer än att bara bläddra i dem vid ett bokbord, men kanske inte läsa varje ord i varje bok, och jag behöver inte äga alla böckerna själv.

Här är mitt urval av böcker.

\* Roman Dobrzynski: La Zamenhof-strato. Samtal med en ättling till Zamenhof.

\* István Ertl: La Postdomo Sati-risk roman med bakgrund i esperantorörelsen.

\* John Francis: La kastelo de vitro Ny roman av känd esperantoförfattare, kanske om en annan värld.

\* Sten Johansson: Katrina malfruas. Lättläst berättelse om en ung kvinnas utveckling.

\* Harold Brown, Leteroj el Svedio Brevsamling, intressant för svenska läsare.

\* Anna Löwenstein: La Ŝtona urbo Ung keltisk kvinna hamnar i Rom under den tidiga kristna perioden.

Anmäl dig till bokcirkeln så här:

Sätt in 275 kr på postgiro 82 26 64-9, Esperantoföreningen Södertörn. Kom ihåg att skriva avsändare! Så här kommer bokcirkeln att fungera:

\* Hämta böcker och byt böcker i en särskild låda på Esperanto-Centro i Stockholm, onsdagar kl 16-18 eller vid andra öppet-tider.

\* Tre veckor är läsetiden för varje bok, förlängning max en vecka.

Anmäler sig många deltagare, så skaffar jag in fler exemplar av samma böcker för cirkulationen.

\* Bokcirkeln start och slut: september 2005 - april 2006.

\* I maj 2006 lottar jag ut böckerna bland deltagarna, så att det blir minst 100 sidors litteratur till var och en. Överskott på verksamheten går till inköp av nya böcker till Esperanto-Centros bokförsäljning.

\* Om du vill byta böcker per post, så debiterar jag porto.

**Ulla Luin**

(kassör i Esperantoföreningen Södertörn)



# Alia raporto pri Internacia Junulara Kongreso



## IJK i Zakopane

Några SEJU-medlemmar deltog i årets IJK (Internacia Junulara Kongreso), som ägde rum i Zakopane i södra Polen mellan den 31 juli och den 7 augusti, och samlade över 400 deltagare. Det var en mycket lyckad kongress, med omfattande seminarieprogram och många konserter.

## SEJU omnämnt i P3

Lovisa gjorde reklam för SEJU i Sommarfrank i P3 torsdagen den 11/8 då temat för programmet var udda föreningar. Kan eventuellt gå att höra fortfarande på nätet [www.sr.se/p3/sommarfrank](http://www.sr.se/p3/sommarfrank). Detta har inte lett till någon respons på SEJUs hemsida än så länge.

## Extra årsmöte och medlemsträff

SEJU höll årsmöte redan den 12 juni, men då vi inte lyckades fatta beslut om bl.a. styrelsens ansvarsfrihet utlyser vi härmed ett extra årsmöte, som äger rum i Uppsala helgen 15:e till 16:e oktober.

På årsmötet kommer följande stadgeändringsförslag att behandlas:

\* Ändamål. Tydligare definiera vad SEJU är och vad vi gör.

\* Medlemskap. Införande av ny medlemskategori för att minska "tröskeln" till att bli medlem.

\* Stadgeändringar. Kräv två på varandra följande årsmöten för att stadgeändringar ska kunna genomföras.

Förslagen i sin helhet, samt mer information om när, var och hur vi träffas, finns på vår hemsida: [www.esperanto.se/seju](http://www.esperanto.se/seju)

Förutom själva årsmötet finns det tid till att träffas och ha trevligt tillsammans. Möjlighet till övernattningsfinns; hör av dig till [seju@esperanto.se](mailto:seju@esperanto.se).

Magnus

## La redakcio de La Espero trovis ankaŭ alian raporton pri IJK en interreto:

Nia aŭtoro Oleg Izjumenko revenis el la IJK en Zakopane kun renovigita entuziasmo. Kortuŝa estis por li la parolado de Etsuo Miyoshi, kiu rakontis pri sia vivo kaj renkontiĝo kun Esperanto. Ĝojiga kaj eĉ miriga estis por li la ĉiam pli videbla rolo de la retroprojekto lernu.net en la estigo de novaj generacioj de esperantistoj.

Kvankam mi partoprenis mian unuan IJK pasintjare en Kovrov (Rusio), la ĉi-jara kongreso estis kvazaŭ mia unua IJK, ĉar mi sentis multe pli da internacieco tie ol en Rusio (nu ja, ĉar mi estas rusoj). Tamen rusoj jam la trian sinsekvan jaron estis la plej multnombra (85 personoj) nacia grupo de partoprenantoj, ĉi-jare kvante superinte francojn kaj polojn.

Kompare kun la pasintjara IJK tiu ĝi estis pli internacia, dank' al la partopreno de japanoj, vjetnamoj, koreoj, afrikanoj kaj nepalanoj. Tiuj lastaj povis veni nur pro granda helpo de TEJO pri akirado de polaj vizoj - ĝenerale estas tre malfacile ricevi eŭropan vizon por civitanoj de Nepalo. Koreoj multe lobiis por IJK-2007 en Busan (Koreio), oni foje eĉ havis impreson, ke la afero pri la elekto de la kongres-urbo jam estas definitive decidita.

Vjetnama Esperantista Junulara Organizo (VEJO) iĝis landa sekcio de TEJO - tio estis decidita dum unu el la komitat-kunsidoj de TEJO. Alia grava rezulto de tiuj kunsidoj estis elekto de la nova estraro de TEJO, pri kio Libera Folio jam informis.

Sendube ĝojigis min la enposteniĝo de mia samklubano kaj eks-samurbano Valentina Sidorova, kaj la estraraniĝo de aliaj miaj amikoj. Mi konas iliajn kapablojn, kaj kredas je bona laborpovo de la nova estraro - sukcesojn al ili!

Unu el la plej interesaj por mi prelegoj estis tiu de deputito de la Eŭropa Parlamento Malgorzata Handzlik, kiu iom skize rakontis pri parlamentaj strukturoj en la Eŭropa Unio kaj - pli detale - prilina lingva situacio en la Eŭropa Parlamento kaj sia elstara (laŭ mia pritakso) agado por Esperanto tie.

Alia tre inspira, emocia kaj kortuŝa estis la elpaŝo de s-ro Etsuo Miyoshi, kiu rakontis pri sia vivo ekde juna aĝo ĝis nun, pri problemoj rilataj al persona kuraĝo, komerco kaj interkompreniĝo kun alilandanoj. Granda parto de lia prelego estis dediĉita al Esperanto: kiel s-ro Miyoshi renkontis ĉi tiun lingvon, kiel eklernis kaj lernadis ĝin, kiel li agas por antaŭenigi ĝin en Eŭropo. Eĉ por mi, aganto por Esperanto dum pluraj jaroj, tiu ĉi sincera kaj persona "konfeso" donis novan inspiron kaj deziron eĉ pli intense agi por la disvastigo de nia lingvo.

Mi kore ĝojis kaj iom miretis pri la grava rolo, kiun nun ludas la retroprojekto lernu.net en la medio de junaj esperantistoj: ŝajnis ke preskaŭ ĉiuj konas ĝin kaj multaj eklernis Esperanton per ĝi kaj uzas ĝin por perfektigi sian lingvo-posedon kaj interkomuniki kun siaj amikoj el la tuta mondo. Antaŭ kvar jaroj, kiam E@I estis nur formiĝanta, oni malfacile povus imagi tian grandan sukceson de ĝiaj projektoj.

Alia kunlaboraĵo inter E@I, TEJO kaj ILEI estis seminario por junaj instruistoj de Esperanto "Flugiloj de malfacila vento", dividita je gramatika kaj metodika partoj. Mi ĉeestis neniujn el ili, do ne povas priskribi la seminarion. Tamen okulfrapis tute profesie faritaj manlibroj por estontaj (kaj jamaj perfektigemaj) instruistoj de Esperanto, kiuj estis reverkitaj speciale por la kongresa seminario. Ili estis aĉeteblaj en la kongresa libroservo kaj baldaŭ estos mendeblaj ĉe grandaj libroservoj (unue ĉe tiu de UEA). Mi rekomendas!

Mi devas diri ke mi revenis de la kongreso kun renoviĝinta entuziasmo por agi por kaj per Esperanto (interalie mi entreprenos ankoraŭ unu provon rete kunigi junajn ekologiemaĵn esperantistojn kaj eble nia neformala reta asocio sukcesos "pliverdigi" la venontjaran Internacian Junularan Kongreson, kiu okazos en Sarajevo). Espereble estis same por la aliaj partoprenintoj!

Oleg Izjumenko

# Svedaj esperantistoj videblis en Vilno


*El pli ol 2.200 partoprenantoj en la kongreso en Vilno, pli ol 60 venis el Svedio, kaj ili estis bone videblaj kaj aktivaj.*

Inaŭguro de la kongreso estis en la dimanĉo, en sporta halo kun nomo de internacia firmao, kiu parte financigis la konstruon. Diplomatoj ĉeestis. Oni legis mesaĝon de la ĝenerala direktoro de Unesko. La prezidanto de UEA faris festparoladon. La ministro pri eksterlandaj aferoj de Litovio ĉeestis por legi mesaĝon de la prezidento de Litovio.

## 60 landoj

En la kongreso ĉeestis partoprenantoj el 60 landoj, kaj tradicia punkto en la inaŭguro de la kongreso estas la mallongaj salutoj el ĉiu el la ĉeestantaj landoj. Gunilla Almér el Stockholm faris la svedan saluton.

Pli poste dum la kongresa semajno, oni povis trovi Gunilla kune kun la internacia koruso, ekzercante por prezento dum la festa programo "Internacia Arta Vespere" je la lasta vespera programo. En la fermo de la kongreso, la lastan sabaton, la sama koruso gvidis kantadon de "La Espero".



*La inaŭguro - el la oficiala parto de la programo. Fotis: Leif Nordenstorm.*

## Artaj aranĝoj

La artaj aranĝoj de la kongreso estis abundaj kaj bonkvalitaj. Litovio prezentis sin al la kongresanoj per la "Nacia vespero" kaj per koncertoj. Aliaj partoj de la mondo prezentiĝis per esperantistaj muzikistoj kiel Daniel Haddad el Brazilo kaj la grupo

Akordo el Nederlando. Du teatraĵoj ricevis iom pli miksitajn akceptojn laŭ kelkaj el la svedaj opinioj. Krome estis recitalo, poezi-prezentoj, spontana komuna kantado en la kongresa halo.

Ĉiutage okazis verkistaj duonhoraj, kun prezentoj de aktualaj esperanto-libroj en la libroservo. La Belartaj Konkursoj de UEA, kiu premias verkojn de beletra, poezio, esejo, dramo ktp, aljuĝis kvar el siaj premioj al svedoj: tri el ili al Sten G Johansson, kaj unu al Leif Nordenstorm. Dum la kongresa semajno oni povis trovi Leif en diservoj, el kiuj la ekumena esti la plej grava.

En la libroservo, kiu ofertis pli ol mil titoloj da libroj kune kun k-diskoj, eblis ankaŭ trovi svedajn aĉetantojn. Roland Lindblom kaptis la okazon aĉeti librojn pri kongresoj, ĵus eldonita en kunligo kun la 100-jara datreveno de la unua esperantokongreso.

## Cent jaroj

Tiu cent-jariĝo estis la ĉeftemo de la kongreso: "Universalaj Kongresoj: 100 jaroj de interkultura komunikado". Por pridiskuti tiun temon, la reĝisoro de la kongresa temo Ulrich Lins kolektis dudekon da personoj, dividitaj je tri podiaj diskutoj pri diversaj aspektoj kaj memoroj pri organizo de kongresoj, informado pri kongresoj kaj personaj spertoj. Franko Luin el Tyresö en Svedio estis unu el ili. La diskutoj pri la ĉeftemo de la kongreso rezultis je rezolucio fine de la kongreso, kun la titolo "Vilna Deklaro".

Aliaj viglaj diskutoj okazis en la kadro de la "Kleriga lundo", kun 42 mallongaj prelegoj, dividitaj en tri paralelaj serioj da blokoj. Sjoerd Bosga, kiu loĝas en Västerås, kaj kiu antaŭ nelonge estis prezidanto de la junulara esperanto-organizo TEJO, partoprenis en bloko pri "junularo tra la jardekoj". Aliaj blokoj temis inter alie pri literaturo, lingvistiko, landaj asocioj, tradukado, internaciaj rilatoj.

## Komitato kunsidis

La sama Sjoerd Bosga estis videbla en la kunsido de la Komitato de UEA kiel la reprezentanto de SEF, elektita por skribi la protokolon. La Komitato laboris sub gvido de la prezidanto

de UEA, Renato Corsetti, je du plenkunsidoj, kaj inter ili je ok subkomitatoj dum la semajno.

Ĝi elektis honorajn membrojn, kaj elektis elekta komisionon, kiu preparos la elektojn de nova estraro post du jaroj, en 2007. La Komitato ankaŭ decidis pri la jarraporto, pri buĝeto, pri membrokotizoj por la jaro 2006, pri ŝanĝoj en la Strategia Laborplano kaj pri kelkaj ŝanĝoj de regularoj. Du novaj landaj asocioj, Niĝerio kaj Irano, estis akceptitaj.

Aliaj laborakunsidoj okazis pri tre variaj temoj. Aro da fakaj asocioj kunsidis. Gunnar Gällmo el Svedio aranĝis kunsidon pri budhanaj demandoj, kaj Soile Lingman por social-laboristoj. En kunsido por ĉefdelegitoj kaj perantoj de UEA oni povis trovi Lisbet Andréasson el Hörby.

## Videbla en Litovio

La kongreso estis bone videbla en Litovio, pro tri kaŭzoj. Unu estis konkreta: la stratoj ĉirkaŭ la kongresejo en granda hotelo proksime de la rivero Neris havis banderolojn kaj pendantajn standardetojn el la kongresa insigno. Alia kaŭzo estis la bona eĥo de la kongreso en la enlanda gazetaro kaj televido. Kaj la tria kaŭzo estis, ke kongresanoj devis moviĝi inter la diversaj ejoj. Gunnar Olsson el Skövde faris tion per biciklo, sed aliaj uzis piedojn, kaj kelkfoje longa vico da aŭtobusoj portis la kongresanojn. Kongresa balo okazis sur ponto, kiu parte iras super herbo, antaŭ ol ĝi atingas la riveron, kaj dancejo estis sub ĝi.

Per tiuj promenoj okazis ankaŭ, ke la kongresanoj sukcesis vidi iom el la urbo Vilno. La kongresaj ekskursoj estis popularaj, speciale tiu pri "La malnova Vilno" sed ankaŭ la tuttaga ekskurso al Kaunas. Pluraj svedoj havas bonajn rilatojn kun la esperanto-aranĝoj en la tri baltaj landoj, kiel ekzemple Soile Lingman kaj Birgit Brenander el Stockholm, kiuj haltis en latva aranĝo survoje al Vilno. Aliaj kongresanoj alvenis jam elĉerpitaj post semajno sen dormo dum la Kultura Esperanto-Festivalo en Helsinko, Finnlando.

Tiuj, kiuj ne volis dormi, povis partopreni la iom ekster-kadran junularan programon dum la kongreso en Vilno. Dumtage promenoj, ekskursoj, paperfaldado kaj ludoj, vespere kaj nokte muziko. Tiuj, kiuj

**LIBERA FOLIO**

Sur tiu ĉi paĝo ni publikigas kelkajn novaĵojn, i.a. pri la UK en Vilno. La Espero prenis ilin de la bonega retpaĝo [www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)

## Proponas Esperanton al EU

Sepdeko da konataj sciencistoj, politikistoj kaj reprezentantoj de la Esperanto-movado tuj post la Vilna kongreso partoprenis la 4-an Nitobe-simpozion en la litovia parlamentejo por diskuti eŭropan lingvan politikon. Kunorganizis la simpozion la parlamenta komitato pri eŭropaj aferoj. En skizo de fina dokumento la partoprenintoj instigas la Eŭropan Union

*Daŭrigo de p. 5.*

ne ankoraŭ estas sufiĉe aĝaj por tia vivo, povis partopreni la infanan kongreseton en dometo ekster Vilno. Tie troviĝis Marta el Göteborg kaj Nora el Malmö inter 39 infanoj, kaj je la fino de la kongreso la infanoj faris ĉarman prezenton de kantoj kaj ludoj sur la scenejo.

### Edukiĝo

Krom kulturo kaj laboro kaj klerigo, estis ankaŭ ebleco edukiĝi dum la kongreso. Anette Hedlund estis unu el la kursanoj de elementa esperanto. Je la alia nivelo, Christer Kiselman estis la praktika organizanto de la prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato kun deko da altnivelaj prelegoj. Kaj en la mezo inter ili, ni trovis Siv Burell, novelektita prezidantino de la sveda sekcio de ILEI, en la "tago de la lernejo", aranĝita ĝuste de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

### Limoj ne videblas

Post la fino de la kongreso, la du miloj da homoj disiĝis en ĉiujn direktojn. La svedaj partoprenintoj ekveturis al postkongreso, al junulara kongreso en Pollando, al instruista kunveno, aŭ per pluraj diversaj vojoj da hejmenvojaĝo. Mi mem pasigis kelkajn horojn da kroma atendo en flughavena restoracio, je invito de la flugkompanio pro malfruigo, kaj je akompano de Inger kaj Kjell Sjöberg el Götene kaj kelkaj aliaj.

El la aero oni ne vidas la limojn de la regno Litovio. Parte pri tio ja ankaŭ temis la kongresa semajno: kontaktoj sen limoj.

**Ulla Luin**

diskuti la eblan rolon de Esperanto por antaŭenigi lingvan egalecon. La definitiva teksto tamen aperos nur, kiam ĉiuj partoprenintoj aprobos ĝin.

## Premiitaj en Vilno

Sabate matene okazis la solena fermo de la Vilna Universala Kongreso de Esperanto. Kiel kutime, en la solena fermo de la kongreso oni anoncis la ricevantojn de diversaj premioj kaj subvencioj. Inter la premiitoj estis la retejo Ĝangalo, la nova honora membro de UEA Roman Dobrzynski, la eldonisto Ulrich Becker kaj la periodaĵo *Monato*. La plej grandan premion, 500.000 japanajn enojn, ricevis agado de UEA mem.

## Niĝerio kaj Irano novaj asocioj

En sia vendreda kunsido en Vilno la komitato de UEA akceptis la aliĝpeton de nova landa asocio el Niĝerio. La aliĝo de Irana Esperanto-Asocio estis akceptita nur kondiĉe: ĝis la fino de aŭgusto la asocio devas skribi konfirmiton, ke ĝi estas neŭtrala kaj malfermita al ĉiuj iranoj.

## Litovio proponas Esperanton en Unesko

Laŭ Renato Corsetti, la reprezentanto de Litovio ĉe Unesko intencas proponi, ke la organizaĵo akceptu novan rezolucion pri Esperanto. Tamen la preciza enhavo de la propono ankoraŭ ne estas konata.

## La traduka servo de EU ne funkcias

La esperantista ano de la Eŭropa parlamento, Małgorzata Handzlik, ne povis partopreni la Vilnan kongreson. Anstataŭe ŝi preparas elekto-kampanjon en Pollando. Ŝin reprezentis ŝia edzo Jerzy Handzlik, kiu en kunsido de Eŭropa Esperanto-Unio rakontis pri ŝia laboro en la parlamento. Laŭ li, la aliaj parlamentanoj nenion scias pri Esperanto. "Ili tute miras ke ŝi konas la lingvon, ke la lingvo ne mortis.

Ili ne volas kredi ke ekzistas gazetoj en Esperanto, kantoj, retpaĝoj."

## Kulturo logis 100

Tuj antaŭ la Universala Kongreso en Helsinko, Finnlando, post kelkajara paŭzo estis aranĝita Kultura Esperanto-Festivalo. La oka KEF daŭrigis la tradicion komencitan en Uppsala en Svedio 1986. Laŭ Sten Johansson la programo estis pinte elstara. Tamen unu afero mirigis lin: "Ĉu nur centoj da esperantistoj en la mondo povas aprezi arte altnivelan unusemajnan festadon de Esperanta kulturo plejparte originala, en simplaj kondiĉoj kun familiara, intima etoso, kie artistoj kaj ĉeestantoj kamarade miksiĝas? Strange!"

## UK ricevis dek minutojn en tutlanda televido

Lunde matene populara aktualaj-programo de la litova nacia televido dum dek minutoj en rekta elsendo intervjuis la prezidanton de Litova Esperanto-Asocio. La intervjuo okazis tuj post la sportaj novaĵoj kaj sendube atingis grandan publikon. En la kongresejo la plej grandan parton de la tago okupis la kleriga programo. Interalie la redaktoro de la revuo Esperanto rakontis, kiel oni redaktu revuojn. Vespere la kongresanoj povis partopreni bankedon kaj la kongresan balon.

## Ok novaj honoraj membroj

Roman Dobrzynski kaj Andrzej Petryn eble estas la plej konataj, kaj certe la plej debatigaj inter la ok novaj honoraj membroj de UEA, elektitaj dum la unua tago de la Universala Kongreso. Krom honoraj membroj sabate posttagmeze estis elektitaj ankaŭ tri novaj komitatanoj kaj nova elekta komisiono. Komitatanoj ankaŭ kritikis la revuon de UEA. La ĵus forpasintaj elstaraj esperantistoj Itō Kanzi kaj Fernando de Diego estas honorataj en la kongresejo per ĉambroj kiuj portas ilian nomon.

## Malgorzata Handzlik renkontis pintan EU-estron

Unuafoje en la historio de la Eŭropa Unio, esperantista EU-parlamentano renkontiĝis kun pinta reprezentanto de la Eŭropa Komisiono. Dum sia rendevuo kun Ján Figeš, Malgorzata Handzlik postulis, ke Esperanto ricevu egalajn rajtojn kun aliaj lingvoj en la eduk-sistemoj en la landoj de la Euxropa Unio. Figeš opiniis la asertojn pri la lernofaciliga rolo de Esperanto interesaj, kaj aludis ke EU povus aranĝi internacian konferencon pri la temo. Tamen laŭ profesiaj lingvistoj ne ekzistas scienca pruvo pri ia aparta propedeŭtika valoro de Esperanto.

## Esperanta televido ŝrumpas antaŭ sia naskiĝo

Internacia Televido ŝrumpas jam antaŭ sia naskiĝo. La ambicia projekto de la brazilano Flavio Rebello fondi esperantlingvan televidkanalon ne sukcesis kolekti la planitan monsumon, 35.000 eŭrojn, kaj tial la planoj devas esti draste reviziitaj. Tion anoncas Flavio Rebello en la retejo Gangalo, kiun li administras. Anstataŭ dek dungitoj la nova reta televido havos nur tri salajratojn. Sed esperantistoj unue devos donaci pli da mono.

**Lördag 24 och söndag 25 september**  
**Veckoslutskurs i esperanto**

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24 i Stockholm (t-bana St Eriksplan, pendeltåg Karlberg).

Tid: kl 11-16, båda dagarna, 40 min lunch (ta med eller besök servering).

Kurskostnad inkl studiematerial och kaffe 230 kr. Studerande under 30 halva priset.

Kursledare Roland Lindblom.

Information och anmälan: Esperantoförbundet, 08-340800.

## SEI-seminario en Lesjöfors 16 –18 Septembro 2005

Vendrede frumatene: Aŭtobusvojaĝo de Stokholmo al Lesjöfors kune kun la 20 finnaj esperantistoj.

Gvidanto dum la vojaĝo: Anita Dagmarsdotter.

Vespera distra programeto.

Sabate: Finnaj kaj svedaj verkistoj prezentas sin, jarkunveno de SEI, muziko

Dimance: Finnaj kaj svedaj verkistoj ... diskuto, muziko  
*Ĉirkaŭ 12.15 Fino* ( kaj reveno aŭtobuse al Stokholmo)

BONVENON!

Lars Forsman  
0586-548 11

Inga Johansson  
031-15 57 23

Por nur **525 SEK** vi ricevos i.a. la gvidadon, kafon kaj sandviĉojn. Ĉiujn sidlokojn, kiujn la finnlandaj esperantistoj ne bezonas, ni ofertas alsvedoj. Estas bona ebleco interparoli kun niaj orientaj najbaroj kaj ekkoni kulturalan pejzagon..

Mi esperas ke multaj svedoj elektos tiun komunan vojagon! La diferenco interplena kaj parte plena buso estas granda.

La sidlokojn por la svedoj ni disdonos laŭ la aligordo.

La svedoj povas aboni la vojagon ĉe mi, Siv Burell, siv.burell@telia.com ; 0302-411 49, Lekstorpsv. 46 E, 443 41 GRÅBO

Mi havas plusĝiron 131 84 71-8. Ne forgesu skribu vian nomon sur la talono!  
Siv Burell

PS Kiam aperas tiu ĉi numero de La Espero la limtago por aliĝo verŝajne jam pasis, do nepre telefonu al unu al la organizantoj. **ndlr**

## LINGVO

### Kial Cx?

En Esperantaj tekstoj oni iam vidas ke oni anstataŭigis la supersignitajn literojn Ĉ, ĉ, Ŭ, ŭ k.t.p. per Cx, cx, Ux, ux k.t.p.

En Esperanto oni normale uzu supersignitajn literojn. Se tamen mankas literoj kiel Ĉ, ĉ en iu presejo aŭ komputilo, oni povas skribi Ch, ch aŭ C', c'. (Ĉe Ŭ, ŭ oni tiam ellasu la supersignon: U, u.)

Nek Zamenhof, nek aliaj malnovaj esperantoj tamen skribis ion pri Cx, cx. Kiu do inventis tion kaj kial? Ŝajnas ke iu inventis tiun skribmanieron kiam komenciĝis la komputila erao. Se oni volas transporti tekston inter malsamaj komputilaj sistemoj, ofte estas pli facile anstataŭigi supersignon per ikso. Oni tamen ne uzu ĝin en normala teksto. En retletero oni tial skribu ch aŭ c' se mankas ĉ al unu el la uzantoj.

Do, se iam aperis "cx" en teksto en La Espero, tio estis pro eraro.

Leif Nordenstorm

## NEKROLOGO


### Anita Bergh



En Upplands Väsby, Svedio, forpasis Anita Bergh post mallonga malsano. Ŝi estis konata redaktoro en "La Hirundo" pri la serio "Du demandoj", kaj multe laboris por libroservo kaj Esperanto-Centro en Stokholmo. Ŝi ankaŭ estis konata pro intervjuoj, kiuj estis dissenditaj pere de radiostacioj en multaj landoj.

(La redakcio de "La Hirundo")

## Simpozio




**Al nova internacia lingva ordo.**

La libro estis pri aktoj de la tria Nito-be-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj pri Lingvaj Problemoj en Internaciaj Rilatoj 25-26 julio 2004 en Pekino. Ĝi redaktiĝis de LEE Chong-Yeong kaj LIU Haito kaj estas skribita kaj Esperante, angle kaj ĉine. En 1921 D-ro NITOBÉ Inazō, Asista Ĝenerala Sekretario de Ligo de Nacioj, skribis raporton pri la uzo de Esperanto kiel internacian helplingvon. Sed lia postulo ne trovis aprobon, sed lia klopodo igis Universalan Esperanto-Asociacion okazigi ĉi tiun simpozion, unuafoje en 1996 en Prago konekse kun la 81-a Universala Kongreso de Esperanto.

La parolantoj emfazas la nunajn lingvajn problemojn, akcentas kiel pli bone estus havi Esperanton kiel mondlingvon kaj avertas kontraŭ la anglalingva hegemonio. Multaj bonaj argumentoj por Esperanto prezentiĝas, sed ili multfoje ripetigas. La libro tial estas iom ripetema kaj povas tedi. Cetere, la libro interesigas onin pri la nunaj mondaj problemoj kaj esperigas onin je Esperanto kiel solvon de monda interkompreno kaj paco.

**Johan Krig Ölund**

## Tria Tinĉjo



**Hergé. La Aventuroj de Tinĉjo. Tinĉjo en Tibeto. 62 p. Casterman. Pantin 2005.**

Post kelkara interrompo aperis la tra libro pri Tinĉjo en Esperanto. Apartan prestĝon al tiu ĉi eldono donas la afero ke la granda eldonejo Casterman, kiu eldonas Tinĉjon en multaj aliaj lingvoj, eldonas ankaŭ tiun ĉi eldonon en Esperanto.

Kvankam mi estas plenkreskulo mi ŝatas legi pri Tinĉjo. Sur la lasta kovrila paĝo mi legas ke: "La albumo 'Tinĉjo en Tibeto' emfazas la toleremon, la amikecon kaj la solidarecon inter la diversnaciaj homoj. Esperanto ĝuste kontribuas al la disvolviĝo de tiuj valoroj tra la mondo." Tio estas unu kialo ke mi ŝatas la libron. La libro temas pri tio ke Tinĉjo iras al Nepalo kaj Tibeto por savi sian amikon Ĉang, kiu malaperis post aviadila katastrofo.


"Tinĉjo en Tibeto" malpli ol aliaj Tinĉjo-libroj respegulas la manieron per kiu Eŭropanoj antaŭ kvindek jaroj priskribis neeŭropanojn. Libro de aliaj tempoj kompreneble estas idoj de tiuj tempoj. La ĝenerala fundo de Tinĉjo tamen estas amikeca.

La libron mi ŝatas ankaŭ pro la bonegaj desegnaĵoj, kaj pro la lerta traduko de Hervé Gonin. La traduko de la sakroj de Kapitano Hadoko ŝajnas esti aparta frandaĵo por tradukistoj. Mi ne donos specimenojn tie ĉi, sed vi devos mem legi la libron por ekscii ĉu la tradukisto sukcesis. Mi tamen povas aserti ke li sukcesis pri la libro ĝenerale.

Bona donaco al infanoj kaj gejunuloj kiuj ekstudis Esperanton.

**Leif Nordenstorm**

## Profunde kaj home



**Sten Johansson. Dis! 135 p. Flandra Esperanto-Ligo. Antverpeno 2001.**

Nur kvar jarojn post la apero mi eklegis "Dis!". Eble ĉar la kovrila bildo iel kredigis min ke la libro ne estas bonkvalita. Ĉar mi legis aliajn librojn de Sten Johansson kun granda kontento, mi tamen fine ne povis ne legi tiun ĉi, kaj trovis ke ĝi eble estas la plej bona verko de la verkisto.

La kadra rakonto de "Dis!" estas aŭtobusa vojaĝo, dum kiu la heroo pensas pri okazintaĵoj dum sia vivo. La heroo - kiu fakte nek estas heroo nek malheroo - sed ordinara homa homo kun kaj bonaj kaj kompatindaj trajtoj pensas pri okazintaĵoj kiam okazis diversspecaj disiĝoj en lia vivo: la naskiĝo, eksekdiĝo, desiĝo de familianoj, kabeigo kaj morto.

Mia ĉefa sento kiam mi legas la libron estas ke la vivo vere povas esti kaj bunta kaj malfacila, sed ĝi ankaŭ estas vivinda kaj mirinda. La ĉefrolulo vere estas vera homo. La verkinto sukcesis priskribi homon kun sentoj kaj problemoj, kiuj sentiĝas realismaj.

Leganto kiu ŝokiĝus pro priskribo de seksumaj aferoj eviatu tiun ĉi libron, ĉar tiaj aferoj priskribiĝas. La libro tamen ne estas pure seksuma libro. Pro tio ĝi meritis pli bonan kovrilon ol la nuna, kiu aludas pri pornaĵo.

La libron mi rekomendas al ĉiuj, kiuj volas legi veran romanon.

**Leif Nordenstorm**